n-ro 64

aprilo 1999

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Nova adresaro: informoj venas, programo ne

Multaj membroj jam sendis korektojn kaj kompletigojn de sia adreso. Tamen, ne venis sugestoj pri uzota datumbazo kiu ebligas ne nur administran prizorgon, sed ankaŭ facilan aperigon de la informoj en Interreto.

RR

## Enhavo

Administrado . . . . . . . . . . 3
Raporto pri la agado de IKEF dum 1998 . . . . . . . . . . 4
Financa raporto, spezokonto kaj bilanco . . . . . . . . . . 8-10-11
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . 9
Turisma Esperanto-Festo, Francio . . . . . . . . . . 12
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . 13
Projekto Profesia Reto fiaskis . . . . . . . . . . 15
Recenzo: Industripioniro rakontas . . . . . . . . . . 16
Novaj membroj . . . . . . . . . . 20

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: Laŭokaza Novajletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Seikô Yamasaki; D-ro Rainer Kurz, S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu !
Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

IKEF-informoj en Interreto: http://komerco.com/ikef

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estis proksimume 1 IRK = 1 USD = 0,85 EUR.
Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.
Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.agoranet.be, belga pĉk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/re-g.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efik-so(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



## Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1998

**P R O P O N O**

Administrado - Grava atentigo al niaj membroj

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1998 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 8-10-11 la financan raporton de IKEF por la jaro 1998, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. Le estraro notas la sumon de financa profito de 22.314 BEF (553,15 EUR) kaj proponas la aldonon de tiu profito al la kapitalo.

4. La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki, ĉiuj elektitaj en 1997, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino, Germanio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Berlino, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta 'La Merkato'.

La Estraro de IKEF

Ni volas apliki Esperanton en internacia komercado, turismo, studado de ĉina medicino kaj lingvoj, k.a. Xi'an Zhiyuan Kultura Kompanio (XZKK), s-ro Qiushi, 221-Nr. 29 Huannanlu Xiduan, CN-710068 XI'AN, telefono kaj fakso: 0086-029-8412463, rete <taiyaanz(a)pub.xaonline.sn.cn>.



**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1998**

**Membraro sur stabila bazo - Pli da perantoj**

La membronombro fine de 1998 estis je la sama nivelo kiel unu jaron antaŭe, nome 136. Dum 1998 aliĝis 22 novaj membroj; konklude same 22 eksmembriĝis. La eksaj estas dispartigeblaj jene: 1 mortinta, 10 propravolaj eksiĝoj pro aĝo, malsano, manko de intereso, 11 eksigitaj de la estraro pro nepago de la kotizo. Tiu lasta nombro rezultis el admona agado, en kiu la prezidanto persone alskribis la nepagintojn - multaj pagis, sed tiuj 11 ne. La nombro de dumvivaj membroj plialtiĝis de tri al ses.

La nombro de perantoj ciferas fine de 1998 ok, t.e. du pli ol unu jaro antaŭe. Aldoniĝis peranto en Belgio (FEL) kaj Ĉeĥio (Hasala). En Italio okazis ŝanĝo de d-ro Picasso al d-ro Polerani. Ni klopodas instali pliajn en landoj kun konsiderinda nombro da membroj aŭ potencialo por membroj. Aspiro pri peranteco estu direktota al la prezidanto.

**La Merkato regule aperis**

Dum 1998 nia interkomunikilo La Merkato regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

**Terminara Sekcio ankoraŭ ne trovis laborritmon**

La laboroj por la Ekonomia Terminaro ("Terminologie Economique" de la Eŭropa Parlamento) ne estis daŭrigataj pro rifuzo de kunlaboro flanke de la EU-instancoj. Ĉar la terminaroj ("glosaroj") de la EU-instancoj ne plu aperas en libra formo, ni ne povas okupi pri ĝi sen la rajto pri atingo al la terminaraj komputilaj datenarbankoj. Ni plu klopodas pri tio, sed se ni ne sukcesus, ni devus iri alian vojon.

**Verka agado je kontentiga nivelo**

La verka agado estis je la sama nivelo kiel en la antaŭa jaro. Tio montriĝis precipe en Monato, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, kie du IKEF-membroj rolas kiel responsaj redaktoroj pri iu fako: Roland ROTSAERT (IKEF 3) pri ekonomio kaj YAMASAKI Seiko (IKEF

43) pri lingvoj. Krom ili, jenaj aliaj IKEF-membroj kontribuis dum 1998 al Monato per verkado de artikoloj: s-roj Al-AMILY (IKEF 255), Marc VANDEN BEMPT (IKEF 251), MU Binghua (IKEF 213), Franz Josef BRAUN (IKEF 4), Gilbert LEDON (IKEF 177), Paul PEERAERTS (IKEF 65), Harald SCHICKE (IKEF 185), Maciej WNUK (IKEF 123), Zandandu Ntomono ZOLA (IKEF 181).

Do la rubriko 'ekonomio' en ĉiuj 11 numeroj de la jaro 1998 estis kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke Monato rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de Monato. Plie aperis en nia interkomunikilo La Merkato kelkaj mallongaj artikoloj pri ekonomiaj temoj.

**Kongresaj aranĝoj en Montpeliero**

Dum la UK en Montpeliero okazis je 5 aŭgusto 1998 la Ĝenerala Kunveno de IKEF kun 48 ĉeestantoj, inter tiuj 22 membroj. La kunveno plenumiĝis laŭ la tagordo kun vigla diskutado pri la celoj de IKEF. Prezidanto Braun estis reelektita, kaj d-ro Rainer KURZ, Germanio, (IKEF 235) kaj s-ro WANG Tianyi, Ĉinio, (IKEF 117) estis nove elektitaj estraranoj.

Je la sekva tago, grupo de 24 personoj vizitis laŭ aranĝo de nia estrarano F.-X. GILBERT (IKEF 14) la Komercan Ĉambron en Montpeliero kaj diskutis kun ties vicdirektoro pri la taskoj de tiu ĉambro kaj pri la ekonomia situacio en la sudfranca regiono Languedoc-Roussillon.

Kune kun TAKE, IKEF funkciigis dum la tuta semajno komunan budon en la kongresejo, en kiu ĉefe deĵoris de nia flanko s-ro Rotsaert kaj flanke de TAKE s-ro Edmond LUDWIG.

Prezidanto Braun kaj Financa Konsilanto Rotsaert partoprenis en la Strategia Forumo de UEA, unuafoje aranĝita kunveno de la responsuloj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj por antaŭenigi nian aferon.

**Laborplano 1998 - 2000 starigita kaj akceptita**

UEA lanĉis la Kampanjon 2000 por internacia lingva ordo. Temas pri agadprogramo kun celtrafaj strategio kaj taskoj por antaŭenigi Esperanton en la publika opinio. Kadre de tio, IKEF



- kiel ĉiuj aliaj grupoj kaj asocioj aliĝintaj al aŭ kunlaborantaj kun UEA - ellaboris Laborplanon 1998 - 2000. Ĝi estis pridiskutita kaj akceptita en la Ĝenerala Kunveno en Montpeliero je 5 aŭgusto 1998 kaj publikigita en La Merkato n-ro 62 de oktobro 1998.

La estraro alvokas niajn membrojn - por ne disipi niajn fortojn - , ke ili koncentru siajn agadojn al tiu laborplano; t.e. ĉiu membro faru ion el la laborplano, kio pleje konvenas al sia profesia okupo, siaj personaj spertoj kaj lerteco. Nur tiukaze li/ŝi mem kaj per tio IKEF kaj Esperanto entute rikoltos optimuman sukceson kaj progreson.

**Kunelaboro kun TAKE**

Grava afero dum la jaro 1998 estis la kunelaboro kun TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistaj Esperantistoj, asocio kunlaboranta kun UEA) laŭ origina propono de la TAKE-estraro. Je 29 aprilo 1998 en Verdun, Francio, okazis unua estrarkonsido. El tio sekvis la decido, ke ambaŭ asocioj dissendu sian organon La Merkato respektive LA DOMO al la membroj de la alia asocio. Tio okazis en julio 1998.

Dum la UK ni funkciigis komunan budon, kaj en aparta nova estrarkunsido IKEF/TAKE ni pritraktis la daŭrigon de onta kunelaboro. Ĉefa rezulto el tio estis la decido, ke ambaŭ asocioj proponas al siaj membroj aliĝon ankaŭ en la alia asocio kaj koncedas al tiuj membroj komunan rabatitan kotiztarifon. Tio validas ekde januaro 1999; la komuna rabatita tarifo estas 27 EUR por membroj el landoj laŭ UEA-kategorio A (riĉaj) kaj 18 EUR por landoj laŭ kategorio B (malriĉaj). La kunelaboro inter ambaŭ asocioj estos daŭrigata ankaŭ en 1999.

**INTERNET-aliĝo kaj retpoŝto forte kreskis**

La uzo de la elektronikaj amaskomunikiloj INTERNET kaj retpoŝto multe kreskas inter niaj membroj. Apartajn laŭdojn sur tiu kampo meritas inter aliaj nia membro Bent HOLM (IKEF 230), kiu instalis kaj prizorgas nian IKEF-an ĉefpaĝon, kaj nia ĉina estrarano Wang Tianyi, kiu daŭre aktualigas liston de IKEF-membroj kun retpoŝta adreso. Wang plie kune kun kolombia partnero instalis novan TTT-ejon http://komerco.com,

kio estas bona servo por niaj membroj. Bonvolu uzi ĝin je via avantaĝo.

**Kontotenado en eŭro**

Dum la Ĝenerala Kunveno en Monpeliero IKEF decidis enkonduki en nia kontotenado la novan valuton eŭro jam je la eble plej frua dato, nome 1 januaro 1999. Tio okazis.

**Partopreno en sciencaj aferoj**

Nia estrarano d-ro Kurz partoprenis meze de novembro 1998 kaj mem prelegis en KAEST (Kolokvo Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), modele organizita de la ĉeĥa E-Asocio sub aŭspicio de UEA kaj ISAE dank'al nia membro d-ro Petr CHRDLE (IKEF 171) en Prago. Informa artikolo pri tio aperis en La Merkato n-ro 63.

**Praktikaj agadoj**

En Monato n-ro 11 kaj 12/98 aperis tutpaĝaj reklamanoncoj - multe notitaj de la Esperantistaro - de la germana entrepreno Robert Bosch GmbH kaj de la svisa firmao Berthold Bolz; ambaŭ estis peritaj kaj tradukitaj de nia prezidanto Braun.

En ĉiu numero de La Merkato aperis komercaj petoj kaj proponoj (entute 22) de E-istaj komercistoj. Ni aperigas ilin senpage por homoj el landoj kun pagoproblemoj.

Inter niaj membroj okazis multaj kontaktoj kaj suksesoj en konkretaj komercoj. Ekzemple nia ĉina estrarano Wang realigis komercojn kun membroj en Bulgario, Francio kaj Pollando, inter kiuj estis la plej granda la liverado de 8 kontenerojn da ĉinaj artfajraĵoj kaj petardoj kunelabore kun nia bulgara membro s-ro Aleksandar ZAĤARIEV (IKEF 243).

La projekto de nia membro Kees RUIG (IKEF 68) pri profesi-komercista reto, aperigita en La Merkato 58 venis al sia fino. S-ro Ruig diskonigas la rezulton en ĉi tiu numero de La Merkato - bedaŭrinde ne sukcesan.

Dum la UK en Montpeliero ekestis la propono, ke IKEF/TAKE organizu en la venontjara UK en Berlin vendejon/bazaron/



ekspozicion por E-istaj komercistoj ene aŭ tuj apude de la kongresejo. La enketo inter la membraro de IKEF kaj TAKE rezultigis neatendite malgrandan intereson. Bedaŭrinde ni devis forstreki ankaŭ tiun eron de nia agado.

Nia informfolio - precipe pro novaj nomoj en la estraro - estis aktualigita kaj disponigita al interesatoj. Nova "identecŝildaro" estas planata, nun per moderna elektronika interreta formo.

**Resumo**

La jaro 1998 alportis al IKEF rimarkindan progreson. La membronombro restis stabila, ĉirkaŭ 10 % ŝanĝis; tio estas normala kvanto. La aktivaĵoj plialtiĝis kaj la stato de niaj financoj estas rekorde sana.

Kiel jam skribite antaŭ 12 monatoj, la celo de nia fakgrupo ne estas akumuli monon, sed elspezi ĝin per celtrafaj agadoj laŭ la ideoj de niaj membroj. Tiurilate en nia Laborplano 1998 - 2000 ni havas celtrafan agadaron, el tio ĉiu membro trovas por si mem ion realigeblan. Se tia promesplena agado postulas iom da mona investado, li/ŝi demandu la estraron pri helpo en tio.

Ankoraŭfoje, el spertoj faritaj ankaŭ en la pasinta jaro, ni denove ripetas: Koncentru vin al agadoj en la Laborplano 1998 - 2000, ne disipu viajn tempon kaj fortojn por flankaj, senefikaj agadoj.

Por la Estraro
Franz Josef Braun

En la lastaj numeroj de la revuo Monato aperis ĉiufoje komerca anonco varbita de F.J. Braun. Nepre rigardu tiun de la marta numero! Memoru ke Flandra Esperanto-Ligo por varbita anonco donas makleraĵon, kiu povas eniri vian propran konton, aŭ kiun vi povas donaci al ekzemple IKEF. Tarifoj aperis en La Merkato 62.

rr

**IKEF-spezokonto kaj bilanco por 1998**
**(vidu je la mezaj paĝoj de la revuo)**

La spezokonto montras profiton de 22.314 BEF; la kapitalo atingas 81.475 BEF. Pro daŭre kreskanta membronombro kaj memorigaj leteroj, ankaŭ la membrokotizoj atingas rekordan ciferon de 62.587 BEF. Estas do rimedoj por - post kelkaj jaroj de malvigla agado - ion entrepreni!

Sub 'Ĝeneralaj kostoj' i.a. estas elspezoj dum UK (budo, projekciilo) kaj vojaĝkostoj okaze de kunveno de IKEF- kaj TAKE-estraranoj en Verdun, Francio. La vojaĝkostoj estis redonacitaj al IKEF de la partoprenintaj estraranoj.

Sub 'Servoj' troviĝas enspezoj pro makleraĵoj kiujn la prezidanto gajnis. Ankaŭ dum la nuna jaro tiaj enspezoj estas atendataj.

Je jarfino la kotizoj ricevitaj de la ĉeĥa peranto ne estis transpagitaj kaj tial aperas debete en kuranta konto. Ankaŭ por TAKE estas nun kuranta konto, tra kiu iras la komunaj kotizoj.

Kiel decidite dum la lasta ĝenerale kunveno, ekde 1999 la IKEF-librotenado estos farata en eŭroj anstataŭ en belgaj frankoj. Estas aldonita kolumno kun kalkulo de BEF al EUR. Pro rondigoj, en la EUR-ciferoj foje estas eta diferenco (0,01 EUR).

Roland ROTSAERT

**Donacoj**

La kasisto dankas pro donacoj kaj krompagoj faritaj de la membroj dum la pasinta jaro: Polerani (20 NLG), Lee (100 NLG), Gilbert (4.500 BEF), Poupeau (120 BEF), Rotsaert (5200 BEF), Braun (280 DEM), Bühl (20 DEM).

**Anoncitaj aranĝoj**



Karlovo, Bulgario, 20-22 aprilo 1999: "Biznes"-forumo kaj ekspozicio de firmaoj dezirantaj uzi Esperanton kiel kontaktlingvo. Kontaktadreso:
Boĵidar Leonov, Esperinform, pk. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario

Kunming (provinco Yunnan), Ĉinio, 1 majo-31 oktobro 1999: Monda Hortikultura Foiro. Ĉeftemo: Homo kaj naturo - marŝe al 21-a jarcento. Informoj pere de Ĉina Radio <cri_pub(a)mail.cri.cngb.com>.

Metz, Francio, 17-23 julio 1999: 'Mono kaj Civilizo'. Prelegos i.a. François-Xavier Gilbert, Yamasaki Seiko. Informoj: fakso (0)3 87 32 03 00, rete <eo-metz(a)osiek.org>.

Xi'an, Ĉinio, 5-9 novembro 1999: 1a Internacia Konferenco pri Agrikulturo kaj Medio, organizata de Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio kaj Xi'an-a Esperanto-Asocio. Kontaktu s-ron Vicio, Jian-Gong-Lu 3, Xi'an CN-710043, Chinio; ret-adreso: <vicio(a)esperanto.nu> <agrikultura(a)esperanto.nu>, tel/fakso: +0086-29-2232952.

En 1990 naskiĝis en Triesto la ideo konkrete realigi projekton pri enkonduko de Esperanto en la komercan kampon. EKA - Esperanto Komerca Agado celas do, fariĝi la perilo por krei tutmondan reton de komerc/ist/ant/oj.

Aktuale oni limiĝas atentigi pri la eblecoj de nia lingvo ekspluateblaj por simpligi la kontaktojn inter diverslingvanoj. Mi kredas ke tio ĉi estas realigebla en Italio kaj eksterlande.

En Triesto mi laboras ĉe kooperativo, kiu havas ligojn kun pli ol 200 fabrikoj, pri la plej diversaj komercaĵoj (ĉefe mebloj, ĉiaspecaj ekipaĵoj por kuirejoj, banejoj k.s., keramikaĵoj, fenestroj, pordoj, ktp.) - entute ĉio por plena aranĝado de loĝejoj.

Mi persone sukcesis kontribui al kreado de vendopunktoj en Pollando por tiu kooperativo, pere de Esperanto. Dank'al tiu sukceso nun mi estas taskigita peri kontaktojn kun aliaj esperantistoj/komercistoj por plilongigi ilian vendoteritorion. Kiu estas interesita kunlabori, povas kontakti min.

Grazia Nocent, Via Caprin 4, I-34137 Trieste
Hejma telefono kaj fakso: 0039/040/662339; laboreja telefono: 0039/040/364603; laborejaj telefono kaj fakso:0039/040/369558; retadreso: eliono(a)tin.it

**Turisma Esperanto Festo en St-Laurent de la Plaine**
proksime al Angers (FR-49)
**Dimanĉe, la 27an de junio 1999**

Programo

9 h 00: akcepto ĉe la Civito pri Tradiciaj Metioj (plej vasta muzeo pri tradiciaj metioj en Eŭropo), aĉeto de la biletoj por viziti la civiton (popersone : 30 FRF aŭ 4,57 EUR - oni povas ankaŭ perletere antaŭaĉeti ĉe la organizanto)
9 h 30 - 11 h 30: vizito de la Civito en Esperanto kun esperantista gvidisto
11 h 30: honorvino en la urbodomo
12 h 30: pikniko ĉe ombro, kun via animado: kunportu vian manĝon, sed ankaŭ viajn muzikilojn, kantojn, teatraĵetojn, bonan humoron...
15 h 00: laŭ elekto
* reiro al la Civito pri Tradiciaj Metioj, kie okazos la Junia Festo, kun multaj tradiciaj metiistoj, bakistoj, skulptistoj, modistinoj, forĝistoj, brodistinoj, florartistinoj, sapfaristoj... (senpage por la matenaj vizitintoj). La festo daŭros ĝis la 19a h.
* vizito de la plej grava birdonaskejo en la mondo Entrepreno Grelier en St-Laurent-de-la Plaine. Maksimume : 30 vizitantoj (senpage). Tiu vizito daŭros 1 h 30.
* babilado...
* promenado... (Loire-veturado ebla)...
* adiaŭa glaso

ENTREPRENARO GRELIER: vizito de 15 h 00 ĝis 16 h 30

Kreita en 1953, la birdobredejo de La Bohardière (St-Laurent de la Plaine) estas la ĉefa entrepreno de la grupo Grelier, kiu nun entenas 850 dungitojn disigitajn en 9 entreprenoj. Fondita de Joseph Grelier, tiu kov-industrio produktas ĉiusemajne 1 800 000 birdidetojn : kokajn, numidajn kaj meleagrajn. Tiuj bestetoj estas liveritaj unutagaj, per aro da 40 kamionoj en Francio, la Eŭropaj landoj kaj en Nord-Afrikon.

La birdobredejo de La Bohardière okupas unu el la ĉefaj rangoj de la Eŭropa birdmerkato. Ĉiaj 560 dungitoj estas disigitaj en pli ol 80 lokoj: bredbienoj, kovejoj, laboratorio, laborejoj, administrejo, sen forgesi 120 kontraktajn produktantojn. Je teknologia pinto, la Entreprenaro GRELIER integris jam de multaj jaroj la koncepton pri konstanta novigado. La kuniĝo de la homaj kvalitoj de la dungitaro kaj de la plej modernaj teknikoj (aŭtomatoj, kontrolado per komputiloj, telesendado de la donitaĵoj) certigas al la kliento ĉiam pli efikan kvaliton pri produkto kaj servo.

Por atingi St-Laurent de la Plaine:
- per veturilo : de Angers (direkte al Nantes), 20 km ĝis StGeorges sur Loire (landa vojo RN 23). En St-Georges iru al Chalonnes-sur-Loire (+ 7 km) kaj al St-Laurent-de-la Plaine (+5 km). La Civito pri tradiciaj metioj staras ĉe la preĝeja placo. Esperanto-Parkumejo ĉe la sport-ĉambrego.
- per trajno : iru al Angers. Se vi informos nin almenaŭ 15 tagojn antaŭe, oni atendos vin ĉe la stacidomo de Angers.

ANGERS situas je 300 km sudokcidente de Parizo, al Atlantiko.



## Komercaj petoj kaj proponoj

### Bulgario

Tipe bulgaraj produktoj: trikaĵoj, diversaj broditaj aĵoj, kolumetoj, tablotukoj, gantoj, E-kasedoj kaj libroj. Kontaktu s-inon Stana DIMITROVA GEORGIEVA, Str. 'Car Simeon' N° 243 A/19, BG-1309 SOFIA, tel. +359-2-214864. Estos en berlina UK.

### Ĉeĥio

SUNALVA Ltd (S-ro Miroslav Smíšek), Kocourkova 456, CZ-356 01 SOKOLOV, fakso 420-168-24953, grupigas kelkajn etajn firmaojn produktantajn tradiciajn ĉeĥajn varojn. Ĝi serĉas aĉetantojn por vitraj kaj keramikaj butonoj, lignaj marionetoj, porcelanaj teaj garnituroj kun ora dekoro (ankaŭ rozkolora porcelano), bieraj kruĉoj.

### Ĉinio

Lampoj: Fabriko dependa al nia kompanio produktas serion de lampoj elektroŝparaj kaj lampobeligaĵoj kun la argumento UL, TUV, CE, EMC por internacia merkato. Por pli vaste okupi internacian merkaton ni serĉas vendiston, importiston kaj peranton por nia produktaĵo. CHANGZHOU TONĜIN COMMERCIAL CO.,LTD., RM.702,7TH FLOOR(E), JINLONG BUILDING, NO.5 WUQING ROAD(N), CHANGZHOU, CN-213003 JIANGSU; tel. ++86-519-8109263 6974932, fakso ++86-519-8109263 6974932; rete <yardly(a)public.cz.js.cn> (S-ro YANG Zhaoyin - IKEF 205).

Importo de Maldelikata Lanolino: Por produkti sian fungicidon kontraŭ la pomkancero, IAEA (Internacia Agrikultura E-Asocio) volas aĉeti maldelikatan lanolinon. (Laŭ PIV, lanolino estas "grasa substanco, enhavanta kolesterolon, defalanta ĉe la lavado de lano k poste rafinita.) Ĝi volos aĉeti 50-60 tunojn unufoje. Ofertu CIF Xingang au Shanghai. Detala informo turnu al s-ro Chielismo VON <informo(a)komerco.com>.

IAEA (Internacia Agrikultura E-Asocio) produktas bon-efikan fungicidon kontraŭ la pomkancero kun marko Verda Stelo. Ĝi estas bonvenigita en la ĉina merkato. Se vi volas koni detalon kaj komercan kondiĉon, turnu al Chielismo VON

<informo(a)komerco.com>, Tel/Fakso: 0086-29-2232952.

Fiŝreto:

| Fadeno | Retkrado FOB Shanghai | | Fadeno | Retkrado | |
|---|---|---|---|---|---|
| 2 x 2 | 15-40mm | 2.8 USD/kg | 2 x 3 | 19-50mm | 2.3 USD/kg |
| 3 x 3 | 22-70mm | 2.2 USD/kg | 4 x 3 | 30-100mm | 2.1 USD/kg |
| 5 x 3 | ......... | 2.0 USD/kg | | | |

La fabriko povas produkti laŭ postulo por fadenoj 4 - 84 kaj retkradoj 15 - 300mm. Turnu al <informo(a)komerco.com>

**Francio**

Ĉu vi deziras informojn pri ekonomio en Anĵuo (franca departemento "Maine et Loire", kun ĉefurbo Angers) ? Bonvolu viziti la TTT-paĝojn :
http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/anjou/ekonomio.htm kaj la ĉiusemajne ĝisdatigatan bultenon
http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/anjou/aktual.htm.

Daniel Durand - http://www.komerco.com/ITRE

**Germanio**

Ofertoj de Jan DZIURKA (IKEF 248, fakso +49-2161-209008, Hofstr. 4, D-41065 MÖNCHENGLADBACH):
- uzataj pres-ofset-maŝinoj 'Heidelberg'
- rimenoj kaj tuboj por industrio laŭ ISO-normoj
- inĝenierado: konstruo de mueliloj kaj diserigiloj por ekz. anhidridoj, fosfatoj, kalkŝtonoj (ne ercoj), malgrandaj fornoj por kunfandi neferajn metalojn
- mueliloj por viando, produktado de medikamentoj, papero kaj preparo de asfalto kun kaŭĉuko

**Kongo** (ekz-Zairio)

S-ro Zandandu Ntomono Zola, B.P. 1821, Kinshasa 1, deziras aĉeti uzitajn (sed ankoraŭ bonajn por komerci) vestojn, precipe ĉemizojn.

**Madagaskaro**

Manlaboroj: brodaĵoj kaj kroĉetaĵoj (littukoj, tablotapiŝoj, jupoj...), maŝinlaboroj: trikaĵoj (puloveroj, kufoj). S-ro RABEVAZAHA Désiré, B.P. 3171 ANTANARIVO.



**<u>Eŭropa Unio: Leĝaro pli facile konsultebla</u>**

Eŭropa leĝaro konsistas el 8.900 bazaj eroj. De tiuj, miloj estas adaptitaj dum la pasintaj jaroj. Por faciligi la konsultadon la Eŭropa Komisiono kunordigis ĉiujn tekstojn. Nun la baza akto kaj la sekvaj ŝanĝoj estas kune en unu teksto. La tekstoj ekzistas en ĉiuj lingvoj de la EU (en sveda kaj finna nur parte). Amplekso de la tuto estas 163 volumoj; kostas 2.350 eŭrojn. Feliĉe ili ankaŭ estas konsulteblaj per interreto je http://europa.eu.int/eur-lex. Atentu: tiu kunordigo ne havas juran valoron!

Alia, pagenda servo (960 eŭroj jare) estas Celex. En ĝi troveblas la bazaj tekstoj. Klarigoj pri funkciado de Celex troveblas je http://europa.eu.int/celex.

RR

**<u>Projekto Profesia Reto fiaskis</u>**

Sufiĉe da tempo pasis por konkludi, ke bedaŭrinde la PPR montriĝis neefektivigebla. La kunlaborontoj ne nur plenumu la por tiaj servoj necesajn kriteriojn, sed ankaŭ korekte komunikadu. Klientoj deziras sufiĉe rapidan respondon. Bona peranto ne estu nur sperta sed ankaŭ memdisciplina.

Se jam dek el la (nur) dudek kandidatoj tute ne reagis al mia dua (faks-, ret-, aŭ poŝt-) letero, tiam oni devas dubi pri la taŭgeco de la servoj. Aldone pri 5 kandidatoj mi ne ricevis la petitajn referencojn. Du el ili prezentis sin tiel impone, ke mi eĉ sen referencoj volus inviti ilin al la profesia reto. Sed do restas tri pri kiuj mankas la necesaj informoj. Unu retiriĝis, konsciante ke li ne povas plenumi la kriteriojn. Kvar kandidatoj prompte reagis, kaj klare montriĝis, ke ili estas valoraj retanoj.

Dudek reagoj jam ne estas multo. Se el tiuj nur ses montriĝis akcepteblaj (kvar komplete kaj du sen referencoj), tiam ni ne plu povas paroli pri internacia reto. Tial mi bedaŭrinde cedas pri la PPR. Ankaŭ neeblas klopodi refoje, ĉar mankas al mi la tempo. Fine de 1999 mi pensiiĝos kaj sen la logistika apogo de la Ĉambro de Komerco, mi ne povos realigi la projekton.

Mi nun enmetis la ses taŭgajn nomojn en liston de internaciaj konsilistoj kiun la tutlanda Unuiĝo de Ĉambroj de Komerco en Nederlnado ĵus eldonis. Tiel espereble la laboro por PPR tamen ne estos tute vana.

Alia menciindaĵo estas ke je mia alvoko pri merkatumaj esplor-oficejoj en la lasta eldono de LM, envenis neniu kaj nenia reago! La Nederlanda Ministerio en kunlaboro kun la komercaj ĉambroj lanĉis subvenciitan programon por instigi mezgrandajn kaj malgrandajn entreprenojn ekeksporti aŭ plivastigi la eksporton. Subvenciitaj instrumentoj estas i.a. merkatumaj esploroj kaj partnera serĉado. La programo celas ĉiujn landojn en la mondo. La nederlandaj komercaj ĉambroj konsilas kaj gvidas la partoprenantajn entreprenojn. Sed ni ne havas sufiĉe da adresoj de personoj kaj organizoj ĉie en la mondo kiuj povas fari merkatuman esploron kaj peri/kontakti eventualajn partnerojn.

Ambaŭ projektoj estis bonaj okazoj por montri la utilon de la I.L. kaj kreskigi la reputacion de Esperanto ĉe la Ĉambroj de Komerco kaj la Ministerio pri Ekonomiaj Aferoj. Eble la tempo ankoraŭ ne estas matura por tiaj profesiaj aferoj.

Inĝ. Kees RUIG



**Recenzo**

**Industripioniro rakontas**

Libroj pri ekonomia aŭ komerca temo ne abundas en Esperanto. Tial mi ĝojas pri la traduko de la libro de sinjoro Kim Woo-Choong, fondinto kaj prezidanto de la grandfirmao Daewoo [deu], kun la titolo 'Vastas la Mondo, Multas Laboro', tradukita de Choe Taesok. Ĝi estas skribita en flua, internacistila, facile legebla Esperanto. Preseraroj tro maloftas por mencii ilin. Ankaŭ lingvaj devioj ne multas.

Enhave la libro iom konfuzas min. La aŭtoro klare montras siajn filozofion, vivstilon kaj laborstilon. Tiu triunuo kreskigis kaj sukcesigis lian ĉebolon[1]. Sed ne nur tio. Semo povas kreski nur en fekunda tero kaj bona sterko plifortigas la kreskon. La tiama postmilita situacio en Koreio estis tiom mizera, la manko de ĉio tiom granda, ke ĉiu industria kaj komerca iniciato estis bonvenigita.

*Korea situacio*

La lando devis esti evoluigata de la fundo kaj la popolo pretis laboregi por sia kaduka patrujo. Sed tiu por evoluo favora situacio ne estas unike korea. Ĉie post katastrofo tio okazas, ekzemple en la eŭropaj landoj post la dua mondmilito. Krome la enmiksiĝado de la korea registaro, iniciato de la tiama prezidanto Park Chung-Hi, per la kreado de favoraj kondiĉoj por industriaj iniciatoj, multe faciligis la entreprenadon. Ĉeboloj povis rapide kaj amasi investi. Krome salajroj estis malaltaj kaj sociaj provizoj ne ekzistis (ankoraŭ hodiaŭ apenaŭ ekzistas). Ĉi tiuj favoraj kondiĉoj zorgis, ke etaj firmaoj, bone gviditaj, facile povis elkreski ĝis firmaegoj. Eksporto estis stimulata per malaltaj, eĉ perdodonaj prezoj (subvenciitaj de la registaro) se nur okcidentaj, stabilaj valutoj estu akireblaj. Do ni ne pensu ke la sukceso de Daewoo estas nur kaŭzita de la talento de ĝia fondinto. Li multege dankas al la eksteraj favoregaj kondiĉoj. Sed li bonege elutiligis ilin: tio estis lia talento kaj merito. Li estis vera pioniro.

Samtempe tiu forto ankaŭ lia malforto estas. Ĉiu entrepreno post pionira fazo eniras la fazon de solidiĝo kaj tiu fazo postulas alitipan gvidon. Ĉu Kim rimarkis tiun transiron? El lia libro tio ne evidentiĝas, ĉar ripetade li pionire admonas la junularon. Fakte la ripetado de tekstoj, eldiroj kaj admonoj estas tiom ofta, ke ĝi ĝenas

[1] ĉebolo (korea: chaebol): Konglomeraĵa grandfirmao konsistanta el pluraj (ofte plej diversaj) entreprenoj.

kaj perdigas la interesiĝon de la leganto. Ĉio kion la verkinto volis diri, povus esti skribita en la kvarono de la nuna paĝonombro. Plue ni ne devas forgesi, ke la libro estas preskaŭ 10 jarojn malnova. Tiam la korea ekonomio atingis sian pinton. Nun la situacio draste ŝanĝiĝis. La protekta mano de la registaro ne plu kovras la ĉebolojn. Importprotektado ne plu ekzistas. Salajroj multe plialtiĝis.

En 30 jaroj la koreoj konstruis imponan industriŝtaton. Tio ne eblis sen la koreaj mentaleco kaj talento tuj kapti eblecojn. La dotita Kim Woo-Choong estas elstara ekzemplo de tio. Ankoraŭ ĉiam li gvidas Daewoo-n en sia konata entuziasma, fanatika sed ankaŭ agresema kaj manipula maniero. Daewoo, unu el la plej junaj ĉeboloj, ankoraŭ kreskas. Ĝi okupas la kvaran lokon laŭ grandeco, aŭ eble, post la ĵusa transpreno de Ssangyong Motoroj, nun la trian. Kelkaj (okcidentaj) financaj analistoj miras kaj timas pri ĝia aŭdaco kaj kreskodaŭro.

Estas pridubende ĉu home la filozofio kaj vivsinteno de la aŭtoro estas sekvindaj. 'Miaj rakontoj temas precipe pri spertoj kaj moralinstruoj', skribas la aŭtoro en la antaŭparolo (p. 17). Laŭ la aŭtoro, oni devas havi revojn, alie la vivo estas kiel senrudra ŝipo. Stranga kaj tro simpla estas la konkludo, ke revhavaj junuloj estas belespektaj. Studento kiu nevolonte studas, estas same malbela kiel tiu kiu kontraŭvole laboras nur por sin vivteni (p. 91). Li invitas junulinojn strebi al sinkultivo (tiam ankaŭ ili plibeliĝas!) kaj partopreni en la ekonomio (p. 66). Li alvokas studentojn studi plenplezure kaj brile por poste sukcese partopreni en la laboro por la socio (ĉar, ho ve, se ne: ili malbeliĝos, p. 91).

*Apliko en Eŭropo*

En ĉapitro 3 li priskribas la akiron de velkanta belga rafinejo, kiel ekzemplon kial li sukcesigas perdiĝintajn entreprenojn. Bedaŭrinde la rakonto estas same malĝusta kiel la konstato de Nôtre Dame situas en Antverpeno. Kim aĉetis la antverpenan rafinejon Universal en 1986 nur por malmultekoste rafini oleon, kiun Daewoo ricevis kiel naturaĵan pagon por konstruprojekto en Libio kaj Universal estis malmultekoste akirebla, ĉar malprofitdona. Sed post la rafinado de la perolea pago oni tuj revendis Universal. Tiel memfidaj konstatoj pri kreita nova etoso pro sindona laboro de la belga Daewoo-personaro ricevas alian prilumon.

Hazarde, dum la studado de la libro por ĉi tiu recenzo mi devis vojaĝi Rumanion kiel ano de ekonomia misio. Mi malkovris ke Daewoo multe investis en tiu lando. Ĝi establis ŝipkonstruejon en Mangalia kaj aĉetis la aŭtofabrikon de Dacia-Peugeot kie oni nun produktas la Cielon. Mi iom esploris pri la agado de Daewoo en Rumanio. Montriĝis,



ke ĝi postulis senimpostan importon de 10_000 Cieloj el Koreio. La profito de la Cieloj estis uzata por pagi la aĉeton de la rumana aŭtofabriko. Do la rumanoj mem pagis por tiu korea investo. Krome la importitaj kaj en Rumanio faritaj aŭtoj havas motoron, kiu konsumas plombohavan benzinon, dum ke en cetera Eŭropo ili (faritaj en Suda Koreio) estas senplombaj. Vera ruzaĵo. Daewoo decidis sendi rumanojn al Suda Koreio por trejnado. Oni ricevos liberan vojaĝon, restadon kaj poŝmonon. Oni ricevis nek trejnadon nek poŝmonon. La rumanoj estis uzataj kiel malmultekostaj laboristoj en la korea fabriko. En la ŝipkonstruejo okazis strikoj kaj disputoj pro malharmonio inter koreoj kaj rumanoj. Tion mi ne legis en Vastas la Mondo.... Bone se iu estas agresema, insista kaj ruza, sed ne nomu tion kristanaj servo kaj sindono aŭ socia misio. Evidente ankaŭ multas malakordoj. Sciante iom da foninformoj, mi legas ĉapitron 25 (talentojn enspezi kaj elspezi) iom alie. Same ĉapitre 26, kie i.a. legiĝas 'Se iu strebas al tro da profito, tio povas esti profito ĉi-momente, sed nenio alia ol tio estas stulta laŭ longtempa vido, ĉar neniu volas plenigi nur partneran poŝon dum daŭra komerco. Ilia rilato baldaŭ finiĝos.' La aŭtoro tute pravas, sed kial li alisence agas?

*Prognozoj ne realiĝis*

En ĉapitro 11 (Scenejo moviĝas orienten) Kim prognozas, ke baldaŭ Koreio ĉefrolos en la internacia scenejo (p. 79). Eŭropo kaj Usono apartenas al la estinteco, Japanio kaj pacifikaj landoj al la estanteco. 'Ili estos subiranta suno, dum nia lando estos leviĝanta suno. Vi devas danki pro via naskiĝo en Koreio, kiu baldaŭ iĝos monda centro, anstataŭ en tiuj landoj, kiuj nun kliniĝas al historia malantaŭo.' (p. 79) La aŭtoro kredas, ke ni ĉiuj iam lernos la korean lingvon. 'Mi kredas, ke nepre venos la tempo.' (p. 81)

Per nobeligo de piratoj Britio stimulis pioniradon kaj tiel konstruis la iaman imperion. Usono senpage disdonis teron al pioniroj kaj tiel inspiris ilin. Hispanio helpis Kolumbon kiu malkovris novan kontinenton (p. 165). Se tiel estas, ke terŝtelado de indianoj kaj detruado de Majo-kulturo instigas la pioniradon, kial do Kim ne mencias la invadon de la japanoj en Koreion kiel pionira stimulo?

Prave la aŭtoro avertas, ke mankas ankoraŭ bona finfaro de koreaj produktoj (p. 40). Prave li alvokas iĝi fakulo (p. 47). Pravas li, ke kreemo estas la kremo de la entreprenado. Do estas multa laboro farenda en lia propra lando, kie kopiado kaj licencproduktado floras, sed inventoj mankas. La atingaĵoj de Koreio estas mirindaj, sed monda centro?

Kim akcentas la valoron de pozitiva pensado. Vere ĝi estas grava ero. Ankaŭ montro de aprezo gravas (p. 175-176). Klare la aŭtoro indikas (p. 130, unua linio), ke gvidanto naskiĝas por la laboro. Ĉiam estas

la elekto: ĉu vi vivas por labori, aŭ ĉi vi laboras por vivi? La elekto de Kim estas klara, malgraŭ la sinteno de la edzino (p. 131, unua linio). Ĉu eble tial nuntempe estas tiom da manko je veraj gvidantoj? Sur paĝo 136 la aŭtoro argumentas, ke la nova generacio havu ni-centran penson anstataŭ mi-centran, do altruisman anstataŭ egoisman sintenon. Tamen en la libro la aŭtoro ĉiam parolas pri 'mi'.

Mi povus daŭrigi citi ekzemplojn de kontraŭdiroj, de saĝaĵoj kaj malsaĝaĵoj alterne, sed mi limigu min al la konstato, ke diversaj temoj estas tro simpligitaj aŭ tro ĝeneraligitaj. Ofte estas pretendoj pri kiuj li ne mencias pruvon. Troas esprimoj kiel konscio, moralo, spirita riĉeco, homkono, fleksebleco kaj mi-mi-mi.

<u>Ĉu sekvinda ekzemplo?</u>

El la libro la aŭtoro aperas kiel kapsula persono. Li priskribas sin mem kiel labormaniulo. Li uzas ĉiun minuton sed ŝajne ne mastras la tempon. Libertempo estas laŭ li tempoperdiĝo. 'Senprudente uzi tempon pli malbonas ol monon, ĉar oni povas regajni monon, sed ne tempon.' (p. 62) 'Daewoo tradicie ne okazigas kunvenojn dum laborhoroj.' (p. 63) Li razas, lavas sin kaj matenmanĝas en la aŭto survoje al laboro. Li ne distras, ne sportas, ne saŭnas (ŝvitu dum laboro, tio sufiĉas), ne familias, nur rapide multe manĝas kaj cetere nur laboras. 'Mia sanfilozofio estas, ke ĉiutaga vivo mem sufiĉas por konservi sanon.' (Kiu medicinisto samopinias?) Kvankam li rekonas la valoron de spirita sano, li praktike ŝajne limigas sin je legado de libro en aviadilo. Kvankam edukite kaj vivante en kulturo, kiu predikas la necesan harmonion inter Jang kaj Jin, nia aŭtoro evidente nur Jangas. Li rekonas la valoron de amikoj, sed kiel fari amikojn se oni jam ne havas tempon por sia propra familio? Verŝajne li celas aferecajn amikojn, sed ĉu ili estas veraj amikoj? Plue li klarigas, ke instigo al entreprenado estas posedo (profito), kiun li malaprobas. Li preferas la 'atingon' kiel stimulilon (p. 185). Mi pensas, ke li simple celas 'potencon'.

En ĉapitro 33 Kim pretendas, ke la plejparto de la homaro ne taŭgas. La morala malvirtiĝo kiel perforto, krimo, narkotiko, speciale en Usono, forigas la pioniran spiriton kaj kreas ĥaoson kaj mankon de kreemo. Mi aŭdacas diri, ke la inverso veras. La maltaŭguloj aperas en la gazeto, ĉar la brava laborantaro ne estas sufiĉe sensacia. Tamen ĝi estas la (silenta) plimulto. Mi volonte defias Kim pruvi mian malpravon.

Konkludo: la libro prezentas la internajn kondiĉojn sub kiuj entrepreno povas esti sukcesa, sed tute ne mencias la eksterajn faktorojn; tial mi iom prilumigis ilin. Ĝi estas persona atesto de la prave fiera prezidanto de la tria korea ĉebolo. Estas bedaŭrinde ke tiom miksiĝas bonaj konstatoj kaj konsiloj kun fabeloj, manipulaĵoj,



simpligoj, entreprenblindeco kaj ĝeneraligoj. Sed li mem avertas nin: 'mi estas labormaniulo'.

Mi finu per citaĵo de la entreprena guruo Meredith Belbin: 'Kuraĝo estas kromprodukto de decidemo. Homoj decidemiĝas se ili havas klaran celon kaj vere volas atingi ĝin. Pro tio fanatikuloj ofte escepte multon kuraĝas. Tio povas tiom etendiĝi, ke ili estas pretaj oferi por tio sian vivon. Tio estas speco de kuraĝo, kiu blindigas homojn kaj ne plu servas iun ajn utilan celon.'. Kiu pravas: Belbin aŭ Kim?

Kees RUIG

Vastas la Mondo, Multas Laboro, de Kim Woo-Choong, 219 p., tradukita el la korea. [pli da bibliografiaj detaloj aperis en revuo Esperanto, sept. 98, lasta kovrilpaĝo]

(Ĉi tiu recenzo origine, mallongigite, aperis en revuo Esperanto)

Dum la Ĝenerala Jarkunveno de IKEF okaze de la pasintjara UK en Montpeliero, la tiama UEA-prezidanto, nia membro LEE Chong-yeong, proponis ke ni ĉiuj kontaktu la landan sidejon de DAEWOO kaj priparolu/petu la libron, por ke la kompanio vere ekkonu la ekzistadon kaj la intereson de la esperantistoj. Ĉu vi jam kontaktis la DAEWOO-filion en via lando?

fjb

## Italio: rearanĝo de telefonnumeroj

En italaj telefonnumeroj ĉiam (ankaŭ el eksterlando) necesas aldoni la nulon en la urba prefikso, do ekz., +39-<u>040</u> 123456 anstataŭ +39-<u>40</u>-123456. Temas pri nova sistemo de telefonado en Italio. Fakte, ĉiam necesas aldoni la kompletan urban prefikson, kun la nulo, eĉ se oni telefonas ekz. de Triesto al Triesto. Simila ŝanĝo estas planita en Belgio ekde 2000. (rr)

Viŝnja Brankoviĉ

## Novaj membroj

205. (realiĝo) S-ro YANG Zhaoyin, Yardly Ideala Komerca Kompanio, 6-1, 94-long, Juqianjie, CN-213003 CHANGZHOU, Ĉinio, °1957, telefono 86-519-3273957, fakso 86-519-6683916
276. S-ro Jiří PATERA, U Ryšánski 1534, CZ-147 00 PRAHA 4,

Ĉeĥio, telefono +420-2-444 601 62

277. S-ro ZHANG Weiqing, No. 201 Shi, 58-haolou, Zaoyang Xiaoqu, CN-276800 RIZHAO, SHANDONG, Ĉinio, °1965, telefono +86-633-8252507, telefono mobila +86-139-6337727, fakso +86-633-8251967, reto <zwq(a)public.rzptt.sd.cn>

278. S-ro Aloïs EDER, Grabenstr. 63A, D-71118 GÄRTRINGEN, Germanio

279. S-ro Bruno FLOCHON, 6 C Av. de L'Hippodrome, F-69890 LA TOUR DE SALVAGNY, Francio

280. S-ino Stana DIMITROVA GEORGIEVA, Str. 'Car Simeon' N° 243 A/19, BG-1309 SOFIA, Bulgario, tel. +359-2-214864

281. S-ro Cédric FORGEAU, 7, rue des Hérideaux, F-69008 LYON, Francio, °1972, telefono+fakso +33(0)478011597, reto <cforgeau(a)esperanto.org>

282. S-ro Mbo Nsele Moyame, B.P. 14.518, Kinshasa 1, Kongo D.R. (serĉas kunlaborantojn por projekto de bierfarado)

283. Dir. WANG Cheng-zhi - Yantai Verd-Stala Arta Kompanio Limitata, 34 Daguan antaŭ-str., YANTAI, Ĉinio, tel. 0086-535-6201088, fakso 0086-535-6251697, reto <grenstar(a)public.ytptt.sd.cn>

## **Esperanto kaj komerco inter la mondmilitoj**

Marc Vanden Bempt (IKEF 251) kolektis informojn pri la grava rolo kiun ludis Esperanto en eŭropaj komercaj medioj en la periodo 1920-1930. Temas i.a. pri partoj el Internacia Komerca Adresaro (1924), Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado (1932), Historio de la Lingvo Esperanto (1927), Pri la solvo de l'problemo de internacia lingvo por komerco kaj trafiko (1923), l'Utilité d'une Langue Auxiliaire Internationale (1922). La materialo estos disponebla en la IKEF-budo dum la berlina Universala Kongreso.



Mi nomiĝas ZangCi. Mi estas esperantisto, komercisto kaj No.274, nova membro de IKEF. Mi loĝas en la ShiJiaZhuang-urbo, plej proksima urbo al Pekino, kie estas ne nur oportuna trafiko,sed ankaŭ abunde produkto. Tie cxi troviĝas plej grandaj merkatoj ledaĵa, ligna kaj drogherba norde en Cinio. Pri mia komercajo estas troveblaj:

1.ĉiutagaj necesaĵoj: skribilaro, ludaro, silko, VCD disko, papero, ktp.
2.naturaj manĝaĵoj: mielo, florpolvo, teo, koturna ovo, sezamo pasto, ktp.
3.metiartaĵoj
4.medikamentoj: kuracherbo, libro pri kuracherbo.

Krome, mi povas liveri diversajn valorajn informojn kaj servojn pri ĉina komerco.

ZangCi <ShuQinL(a)sj-user.he.cninfo.net>